

& Verda stelo:

< Rekante 21 el 43 batoj por strofo, entute 348 paŝoj dum 4 minutoj. Verkis Stanislav Schulhof (Per espero al despero, Pardubice 1910) kun vortoj "Ĉi tiun mian unuan poemon mi dediĉas al Majstro Dro L. L. Zamenhof, kiel pruvon de mia admiro kaj dankemo". Baladigis Martin Strid (2016) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

(#Melodio:

<:43> (

/dodo Tido redo TiLa; SoSo SoSo doTi La La; dodo Tido redo TiLa; ; dodo Tido redo TiLa; SoSo SoSo doTi La La;

(#Rekantaĵe: mi dore mi do; mimi rere dodo Ti; mi dore mi do; mi dore mi do; mimi rere doTi La a)

)×8)+

(&Strofoj:

'1 /Bruas vento furioza, ; konvulsias ŝip' kaj velo. ; Granda maro ondiĝinta ; kun la nokto kunmiksita ; - malproksima nia celo.

(×: **Dancu ni kune ; Tretu en la ĉeno nun ; Sune kaj lune, ; jam oportune ; Tretu en la ĉeno nun.**)

'2 Tremas, krakas nia ŝipo, ; masto ĝemas en la vento. ; Sang' en korpo malvarmiĝas, ; vort' en buŝo silentiĝas, ; koron premas antaŭsento.

'3 Ĉie ĝemo, plendo, timo. ; Nur la homo sur la ponto ; firme, kiel ensorĉite, ; tondron, pluvon, ĉion spite ; vagas en la horizonto.

'4 Vagas en la horizonto, ; sed ne trovas sian celon. ; En ribel' de l' elemento, ; en la pereiga vento ; perdis sian verdan stelon.

'5 Ĉu vi konas verdan stelon, ; tiun stelon de l' idaro? ; Naskis ĝin la oriento, ; ekbrilis en okcidento, ; en Bulonjo sur la maro.

'6 Kia estas verda stelo? ; Malgrandeta kiel lento, ; sed se lumo ĝia brilas, ; tuj glacioj malaperas ; kaj varmiĝas kontinento.

'7 Nur kriegu, brua maro, ; vana via granda forto! ; En malgranda luma lento, ; kiun naskis l' oriento, ; bazas nia kor' kaj sorto.

'8 Verda stelo, – mova forto, ; ho, aperu en la nuboj! ; Lumu en la krizmomento, ; masto ĝemas en la vento, ; malfermiĝas nigra subo.)